

# TEJO-realigplano por kunsolvi la planedan krizon

## **Kialoj kaj difinoj**

Kial ni faras tion?

- Baze estas grava ke TEJO kontribuu al mondplibonigo kaj ĉesigo de klimatsanĝo
- Montri bonan ekzemplon
- Videbligi la tutmondecon de daŭripovecaj temoj, uzante nian komunumon por videbligi tion en eksteraj rilatoj
- Kunpartigi, subteni alies iniciatojn
- Krei debaton, diskuton, engaĝiĝon en la movado.

Daŭripoveco rilatas al medio/ekologio, sed ni povas ankaŭ pensi pri ekonomio, socio, egaleco.

## **Mezurado**

Kiel mezuri la ĝisnunan "piedŝpuron" de TEJO?

Ni listigu ĉion, kion TEJO **jam** faras por malpliigi ĝin.

Ni dividu kalkuladon en rekta karbokreado de TEJO kaj malrekta de partoprenantoj, vojaĝoj.

Vojaĝoj plej gravas. Ni mezuru la efikon de aviadilvojaĝoj.

- Kiom da homoj venis al la kongreso? Per kiuj vojaĝiloj?
- Se ili ne venus al la kongreso, ĉu ili tamen vojaĝus? Diferenco?
- Homoj kun subvenciata vojaĝo verŝajne alikaze ne vojaĝis. Homoj kiuj pagas mem, eble irus aliloken. Indus fari enketojn pri tio.

Ĉu arboplantado faras diferencon? Kontrolu fontojn pri tio.

Rapidkalkula sistemo dum kongresoj por ke homoj povu kalkuli sian piedŝpuron.

Fine de la kongreso homoj ricevus ekzemple PDF-on kun sia piedŝpuro. La informoj pri tio aperu en aliĝilo kaj informiloj, ankaŭ informoj pri tio, kiun diferencon faros se vi elektas specifan menuon aŭ ĉambro (viandmanĝanto, unupersona ĉambro, ...)

## **Pliboniga plano**

*Renkontiĝoj, eventoj fizikaj (Esperantaj kaj eksterrilataj)*

- Transporto al kongresoj kaj eventoj (ne subvencii, aŭ nur en kelkaj kazoj subvencii aviadilajn vojaĝojn?)
- Gravas pensi pri tutmonda egaleco - multaj aktivuloj ne povus partopreni en IJK sen flugi, ĉu eblas krei ian etikan daŭripovan gvidlinion konsiderante ambaŭ flankojn?
- Trajn/buskaravanoj ekster Eŭropo, por alveni al tiea kongreso aŭ vojaĝi kune al flughaveno por aliri eŭropan kongreson
- Subvenciado de neflugaj ebloj kaj tranoktado
- Reguloj pri kiam flugi kaj kiam ne (distanco? Interkontinentaj flugoj?)
- Menuoj dum kongresoj (adapti la prezon de la diversaj ebloj por kuraĝigi vegetaran/veganan elekton kaj malkuraĝigi viandan)
- Materialoj dum kongresoj kaj eventoj (limigi uzadon de unufojaj materialoj, kuraĝigi uzadon de reuzeblaj. Malkuraĝigi uzadon de papero, kuraĝigi alternativojn)
- Ni organizu kongresojn tiel ke homoj estu kuraĝitaj resti longe en iu loko kaj ne flugi al diversaj lokoj (ekz. UK/IJK en sama kontinento)
- Individua piedŝpuro dum kongresoj (vidu mezurado)

#### *Distanca, reta laboro*

- Daŭripoveco de retaj servoj (aparta teamo por tio?) : alternativaj sociaj retoj, servilo por AKSO, ...
- Subvencii retaliron por homoj, kiuj ne povas/volas vojaĝi
- Kuraĝigi retajn agadojn, substreki la avantaĝojn, provizi rimedojn, subtenon

#### *Movado/Ĝenerale*

- Arboplantado (UEA jam faras ion tian?) Ne tiom efika por daŭripoveco, sed ni povas subteni lokajn iniciatojn kaj ligi arboplantadon al konkretaj projektoj por videbligi ilin.
- Klerigaj projektoj pri daŭripoveco
- Projektoj por eduka kaj kultura evoluigo de komunumoj (ĉu lokaj, ekz. kie okazas renkontiĝoj, ĉu tutmonda)
- Uzi Esperanton kiel lingvon por eduki
- Plibonigo de terminaro pri la temo de daŭripoveco, ekz. ĉe Vikipedio

#### *Sidejoj: energio, akvo, recikligo*

- Ŝanĝi al pli renoviĝanta energio
- Ŝanĝi lampojn
- Disvastigi ŝparan uzadon
- Efektivigi manierojn por reutiligado de akvoj
- Efektivigi recikligon

- Disvastigi recikligon

### *Homaj rajtoj*

“Por respekti homajn rajtojn, organizoj havas la respondecon identigi, malhelpi kaj trakti realajn aŭ eblajn efikojn al homaj rajtoj rezultantaj de ĝiaj agadoj aŭ agadoj de tiuj, kun kiuj ĝi rilatas.” (ISO 26000)

- Kiel TEJO observas la homajn rajtojn de siaj kunlaborantoj,
- Atentigi pri homaj rajtoj en landoj kie estas esperantistaj junuloj
- Subteni landajn organizojn pri homaj rajtoj kie okazas IJK kaj aliaj renkontiĝoj de TEJO

### *Laborpraktikoj*

“Laboraj praktikoj de organizo inkluzivas ĉiujn politikojn kaj praktikojn pri la plenumita laboro ene, por aŭ nome de la organizo, inkluzive de subkontraktita laboro.” (ISO 26000)

- Kiel TEJO observas la laborajn rajtojn
- Kiel TEJO informas al siaj dungitoj pri iliaj rajtoj
- Atentigi pri laboraj rajtoj en landoj kie estas esperantistaj junuloj
- Subteni landajn organizojn pri laboraj rajtoj kie okazas IJK kaj aliaj renkontiĝoj de TEJO

## **Procezo**

- Ĉiu TEJO-aktivulo kaj ĉefe **Komitatanoj** estu liberaj kontribui al ĉi tiu plano, ĉu kun aŭ sen ani en la teamo pri Daŭripoveco / ĉeesti kunsidojn.
- La daŭripoveca teamo estas por tiuj, kiuj ŝatus pli profunde prilabori tion.
- La **Komitato** aprobu la planon kiam ĝi pretos, kaj poste la tuta organizo respondecu pri ĝia efektivigo (estraro, komitato, oficistoj, volontuloj, ĉiuj aliaj aktivuloj)
- Tamen apartan rolon devos ludi kelkaj komisionoj, ekzemple **Kongresoj kaj Eksteraj Rilatoj**.
- Kongresoj subtenos **LKK**-ojn (Loka Kongresa Komitato: organiza teamo de kongreso) por organizi daŭripovajn kongresojn; KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) subtenos la aktivulojn, kiujn ĝi sendas al renkontiĝoj por vojaĝi daŭripove, reklamos nian daŭripovan agadon alekstere kaj motivigos aliajn organizojn havi propran planon.

## **Utilaj Fontoj (Dokumentoj kaj mezur-metodoj de internaciaj organizaĵoj)**

Ligi al la UN-Daŭripovecaj Celoj (UEA jam multe faris pri tio: Libreto)

- ISO (ISO 26000; ISO 14000)  
<https://www.iso.org/home.html>
- Ekologia Premsigno  
<https://www.worldwildlife.org/search?cx=003443374396369277624%3Av3nraqhmeyk&ie=UTF-8&x=footprint#gsc.tab=0&gsc.q=footprint&gsc.page=1>  
<https://footprint.wwf.org.uk/#/>  
<https://www.footprintnetwork.org/>
- Global Reporting Initiative (GRI)  
<https://www.globalreporting.org/>
- Carbona Premsigno  
<https://www.carbonfootprint.com/calculator.aspx>  
[https://en.wikipedia.org/wiki/Carbon\\_footprint](https://en.wikipedia.org/wiki/Carbon_footprint)
- Vivo-Cirkla Taksado  
[https://en.wikipedia.org/wiki/Life-cycle\\_assessment](https://en.wikipedia.org/wiki/Life-cycle_assessment)
- Ellen MacArthur Foundation (Cirkla Ekonomio)  
<https://www.ellenmacarthurfoundation.org/>
- Traduko de diagnozilo por oficejoj (povas esti utila por gvidlinioj aŭ politikoj por sidejoj kaj kongresoj)  
[https://docs.google.com/document/d/1ifm\\_-TZI\\_5oJvE6FkF5DkTEWSEKiSQjF4hOoKY-pLm8/edit?usp=sharing](https://docs.google.com/document/d/1ifm_-TZI_5oJvE6FkF5DkTEWSEKiSQjF4hOoKY-pLm8/edit?usp=sharing)

## Ideo de strukturo

### Enkonduko

Okazas en nia planedo ekologia krizo kiu minacas nin ĉiujn. Por ke ni daŭriĝu en la mondo kiel ni konas ĝin, homoj, organizoj, firmaoj, ŝtatoj, kaj aliaj devas kunlabori por haltigi ĉi tiun krizon. La maniero per kiu ni atingas tiun celon estas esti daŭripovecaj.

Daŭripoveco estas la kapablo plenumi niajn bezonojn kaj homajn rajtojn sen endanĝerigi la planedsistemojn kiuj entenas la vivon. En ĉi tiu dokumento, TEJO priskribas sian planon por apliki daŭripovecon en sia agado. Kadre de daŭripoveco, la kernaj celoj de TEJO estas:

- kontribui al la mondplibonigo kaj ĉesigo de klimatsanĝo kaj ekologia krizo montrante ekzemplon de kunlabora daŭripoveca agado kiel organizo
- videbligi la tutmondecon kaj gravecon de daŭripovecaj temoj, uzante nian komunumon por videbligi tion en eksteraj rilatoj
- estigi daŭripovecan etoson per publikaĵoj, debatoj, diskutoj, kaj aliaj rimedoj por ke Esperantujo konu la temon kaj opiniu pri la temo
- subteni la iniciatoj kaj esprimoj de esperantistoj je daŭripovecaj temoj

Por atingi ĉiun celon TEJO prilaboros ilin baze de la sekvaj principoj:

1. Kunlabora partopreno: ĉiuj estas liberaj kontribui al la plano kaj al la agado de TEJO rilate al daŭripoveco
2. Evitemo: kunlabori eviti efikojn aŭ damaĝojn per anticipa agado kaj minimumigi tiujn kiujn oni ne povas eviti.
3. Realismo: la plano devas esti aplikita per atingeblaj agoj konsiderante la rimedoj, kapabloj kaj kunteksto de TEJO.
4. Gradeco: bezono grade kaj daŭre agadi por ke TEJO atingu plenan daŭripovecon.

## Realigo

TEJO aldonos daŭripovecajn planitajn agojn al sia jara realigplano por atingi la daŭripovecajn celojn. Ĝi faros tion sekvmaniere:

- 1) TEJO taksos la staton de daŭripoveco ĉiujare. Ĝi informos ĝin al Esperantujo kaj kunlaboros kun ĝi por difini la prioritatajn koncernojn de la jaro.
- 2) Tiuj koncernoj fariĝas jaraj planigitaj agoj aldonitaj al la realigplano de TEJO. La planigitaj agoj estas taŭge enkadrigitaj sub la agadon de la komisionoj.
- 3) La Daŭripova Teamo estas transversa teamo kiu apogas la komisionojn kaj profunde prilaboras la daŭripovecajn planigitajn agadojn.

## Agadkampoj

1. Karbonspuro
2. Renkontiĝoj
3. Reta laboro
4. Movado
5. Sidejoj
6. Homaj rajtoj
7. Laborpraktikoj